

Dumonata kultura informilo k' esprimilo esperantista. 2,50 FF

ISSN 0150-5823



Eldonas : Cercle espérantiste de \* Abono por unu jaro : 15 FF  
l'Agenais, F 47340 LAROQUE \* (12 FF por Francio)  
Poŝtkonto : 3 371 74 N Bordeaux \* al la ĉi-apuda pĉk.  
\*\*\*\*\*

## ENHAVO

2. Esperanto-gramoj (Antoni Madej)
3. Nia migrado : Margene de la Rijeka kongreso (L.Pelletier)
9. Restado en Jugoslavlando (II) (G.Dumont)
13. Tra Eŭropo per fervojo kaj Esperanto (Jakelino)
17. Jus aperis (G.Roux)
18. Feliĉlando (-nn-)
19. Nia felietono : Tra la mondo per biciklo (Alfa-Beta)
21. Nia debato : Respondo al Jakelino (H.Elik)
23. Ĝardeneto de la senkulpuloj (kom. de J.G.)

\* \*  
\*

Esperanto-Vivo : 36a SAT-Amikara kongreso en Annecy, Paŭo,  
Souillac, Girondio ...

Tiu ĉi numero esperable aperos iom pli frue ol estis anonc-  
ite. La celo : anonci kunvenon en la komenco de novembro.  
Ne plendu la abonantaro : ĝi rajtos plian numeron antaŭ la  
jarfino... antaŭ la tradicia alvoko al ĉies monujo !...  
P.S. Ne serĉu desegnojn. Tiu ĉi n-ro estas teruro teda.

Verda Kopernikaĵo

La verda stelo  
ne estas astro  
sed nia celo  
diris la pastro.

x x x

Esperanto tre facilas  
kiam oni krokodilas.

Al kongresedzinoj

Virino tre konkreta ?  
Virin' senkalsoneta.

Post...

Post agrabla peko  
tre plezura veko.

Pri mono

Feliĉon ne donas mono,  
asertas pri tio homoj.  
Sed por disonanco,  
donas ĝi bonŝancon !

Cedo

Ankaŭ in' esperantista  
cedas al parol' insista.

Antaŭen!...

Per la insigno de la espero  
Ne antaŭenigos ni l'aferon.  
Pli taŭga estas por nia celo  
Svelta junulino kun mambelo.

Ne malavari sapon

La knabin' kiel floro  
Pro naztorda odoro.

Sinjorino

Ŝi havas avantaĝojn.  
La plej grava, la /s/aĝo.

M a r ĝ e n e  
d e l a R i j e k a  
k o n g r e s o

Mi ne celas raporti pri la 53a SAT-kongreso, sed nur rakonti pri mia vojaĝo kaj restado en Triesto kaj Rijeka.

Mi haltis en Triesto por viziti tiun urbon, pri kiu oni multe parolis ĉ. 1947 kaj ĉefe partopreni la vendredan kunvenon de la Triesta Esperanto-Societo.

En Triesto oni vidas rapide ĉiujn etnojn de Jugoslavio kun iliaj tradiciaj vestaĵoj. Ili longe vojaĝas por veni aĉeti ĉion, kio mankas en iliaj landoj : lesivoj, kafo, precipe. Vi rimarkas, ke en multaj butikoj la prezoj estas indikitaj en italaj liroj kaj en jugoslavaj dinaroj. Posttagmeze sur la trotuaroj amasiĝas la diversaj varoj antaŭ ol malaperi en kofron de veturilo aŭ en specialan dorsosakon de fortaj jugoslavinoj, kiujn ni revidos la sekvontan matenon, ĉar la trajnoj al Jugoslavio ne estas multnombraj. Mi estas gvidata de maljuna SAT-ano, membro de la Triesta Esperanto-Societo. Ni vizitas la ĉefajn vidindaĵojn de tiu urbo, al kiu mankas la periferio : en 1947, kiam la "Libera Urbo Triesto" decidis aniĝi al Italio, estis du zonoj A kaj B. La jugoslavo forprenis la zonon B, lasante tiel la havenurbon sen ĉirkaŭaĵo. Tito, tiam stalinisto, aneksis eĉ la duonon de tombejo por respektigi la rektan linion de la landlimo inter Italio kaj Slovenio... Tiam por iri al tombo de parenco kuŝanta aliflanke de tiu linio necesis pasporto. Nun la interesatoj prezentas ĉe la "landlimo" nur dokumenton, kiu atestas, ke ili estas landlimanoj. Mia kamarado diris al mi, ke nun la rilatoj inter Slovenio kaj Triesto estas tre bonaj. La Slovenoj vivantaj en Triesto havas statuton de minoritato, kiu rajtigas ilin havi radion, televidon, lernejojn, kulturajn societojn, ktp. Komparu en Francio pri la rajtoj de la Okcitanoj, de la Bretonoj, de la Korsikoj, k.a. etnoj de la transmaraj teritorioj...

La haveno ne interesas Romon, ĉar Venezia estas tute proksima. Triesto estas la plej kara urbo el Italio, ĉar ĉio venas el malproksime. Trista estas Triesto : grandaj placoj sen arboj, sen verdaĵo kaj sen benkoj por ripozi... Post la 19a horo, dum ardas la julia suno, la trafiko ĉesas kaj antaŭ ol

iri al sidejo de la E-Societo, oni malfacile trovis restoracion ĉe la haveno, kiu proksimas de strato Trento. La plej ĝojigaj momentoj, kiujn mi vivis, estas en la kunveno de T.E.S., kiu sukcesas arigi tridekon da gejunuloj dufoje en la semajno de la 20a ĝis la 22a horo por babili en esperanto, por partopreni perfektigajn kursojn aŭ prelegojn. Tiun vesperon estis mi, kiu paroladis, respondante al plej diversaj demandoj pri mia vivo en la movado, kial mi estas SAT-ano, pri ekonomia situacio en Francio, kie la problemoj similas al tiuj de Italio: nigra laboro, deficino de sociaj asekuroj, senlaboreco, ktp. Kelkaj junuloj estis irontaj al UEA-kongreso de Stockholm, aliaj venis al Rijeka, kie mi renkontis ilin en la memserva restoracio. Mi dormis en hotelo kun duobla prezo: sur la pordo 14000 liroj kaj en la tirkesto de littableto alia slipo 11000 liroj... sed mi ne havis tempon diskuti, ĉar mi rendevuis por matenmanĝi sur placo, kie komercas la Slovenoj de Triesto kun la Slovenoj de Jugoslavio.

En la relstaciatendejo mi renkontis svedojn kaj aliajn SAT-anojn... la trajno malfruis plurajn horojn... Kiam ĝi alvenis, ni havis problemon por supreniri en la vagonon, ĉar la jugoslavo plenis ĝin per dikaj pakoj kaj lesivaj bareletoj... Tio memorigas pri la trajnoj de la jaroj 40-45, kiam la urbanoj iris serĉi manĝaĵon en Bretonion, en Normandion aŭ en Aŭvernion. La trajno ruliĝas malrapide ĝis la lasta itala stacio Villa Opicina, kie la italaj policistoj apenaŭ rigardas niajn dokumentojn. Sed en la unua stacio de Jugoslavio Sežana ni havas viziton de la milicianoj de la Socialista Federacia Respubliko de Jugoslavio kun ruĝa stelo. Ili atente rigardas la dokumentojn: oni ne bezonas pasporton, se oni restos en Jugoslavio malpli ol 30 tagojn, sed oni devas pagi enir-raĵton ĉirkaŭ 10 FF. Oni donas al vi kuponon kun la enirdato. Ne forgesu redoni ĝin, elirante el Jugoslavio! Do ŝparu 140 FF, ne aĉetu pasporton por iri en Jugoslavion, se vi restos nur unu monaton!

Ĉiu vojaĝanto rajtas kunporti en Jugoslavion 1 kg. da kafo. Kompreneble, neniu havis pli... sed la doganistoj zorge esploris sub la benkoj, en la valizoj, sur la bretoj... ili prenis sian tempon por enspezi la ĝustajn impostojn. Tiu esploro daŭris plurajn horojn en vagono hejtata de l' somera arda suno...

Fine, malrapide la trajno Parizo-Beogrado alvenas en Pivka. Oni saltas sur la ŝtonojn de l'balasto, ĉar ne estas trotuaroj en la relstacioj de Jugoslavio. Mi konsilas kunporti ŝtupareton por malsupreniri kaj supreniri, aliel vi riskas rompi viajn membrojn! Do en Pivka ni havis relaŭton (unu-vagona trajneto), sed ni devis sporte grimpi, ĉar ne estis kajo kaj alta estis la piedbreto! Fine ni alvenis kun granda malfruo en Rijeka... sentrotuara relstacio... sed laŭtparolilo bonvenigis nin en nia kara sennacieca lingvo. En la akceptejo ni aŭdis vorton, kiun ni ofte aŭdis dum la semajno: "estas ŝanĝo"... ne eblas loĝi en la amasloĝejo; estas ŝanĝo: la kunveno, kiu devis okazi en la Domo de Sindikatoj, okazos en la Domo de Fervojistoj... Mi lasas ĉi parton al tiuj, kiuj raportis pri la Kongreso.

Hazarde mi estas loĝata kun ĉarma okdekjarulo, kiu neniam eliris el sia lando. La dommastrino parolas germane kaj ni tiel povas konversacii, sen nenia studo ŝi flue legas la kongreslibron, ni tre simpatias, ni ricevas ĉi-matene komfortan matenmanĝon sen suplemento kaj ofte kukojn, kiujn ŝi preparas por la familio! Ni situas inter la Fervojista Domo kaj la relstacio, sed dum estas memserva restoracio tute proksime, ni devas marŝadi 2 km proksime de la haveno, kie estas la oficiala kongresa memserva restoracio, angule de la longa Rade Konĉara strato... Tio estis okazo por vidi la densan trafikon, kiu neniam ĉesas. Ni rimarkis la belajn, junajn policistinojn blanke vestitajn kun belaj longaj manŝuoj kun manikoj ĝis la kubuto! La nura laboro de tiuj belaj ulinoj konsistis fajfi, se piediranto provis trapasi, kiam la semaforo estas verda por la veturiloj. Ni rimarkis ankaŭ la elegantajn ĉapeletojn... kaj ni komparis kun la neelegantaj vestaĵoj de niaj trafikpolicistinoj. Ni rimarkis, ke la trafiko de la piedirantoj estas sama kiel tiu de la veturiloj.

Oni trovas restoraciojn ĝis la 22a horo. Oni trinkas multe da alkoholo. La trinkejoj estas plenaj ĝis la 22a horo, sed neniam ni renkontis ebriulon.

Ĉiutage mi legis italan gazeton de la minoritato de Fiume kaj Istrio, ĉar la etno itala estas multnombra en tiu parto de Kroatio kaj pere de itala lingvo mi havis interesajn konversaciojn kun ge-Rijekanoj pri memmastrumado, kiu estas en ĉiuj sektoroj.

Estas multaj privataj entreprenoj, sed oni instigas ilin aniĝi al ĉenaro, kiu funkcias laŭ kooperativa sistemo, kie estas aplikata la memmastrumada metodo. Nenie oni parolas pri ŝtato : eĉ la fervojoj aplikas la principojn de entrepreno memregata de la laboristoj. Sed ĉar la individuoj ne estas perfektaj, la memregado prezentas malavantaĝojn al konsumantoj : ju pli ŝparas la entrepreno, des pli da profitoj por la laboristoj. Se vi ne havas varman akvon en via hotela ĉambro, se nur unu lampo funkcias... tio ŝparigas elspezojn... jen la vera "ĉasogaspi". Rijeka kun periferiaj komunumoj nombras pli ol 200.000 loĝantojn sur distanco, kiu etendiĝas 9 km laŭlonge de l'marbordo...Nu, laŭ tiu principo estas apenaŭ 10 apotekoj...Tio devigas la malsanulojn longe vojaĝi per plenplenaj aŭtobusoj por pliŝveligi la profiton de la kooperativo mastrumanta la apotekojn (Ljenarka en kroata lingvo). Mi legis, ke estas senĉesa lukto inter la memmastrumaj komitatoj, kiuj reprezentas la laboristojn, la uzantoj kaj la burokratoj, la teknokratoj kaj aliaj superuloj de l'eterna administracio. Sed la sistemo estas perfektigebla kaj estonte, kiam oni trovos en kongresejo valizeton kun nomo kaj adreso de K-dino Calas, oni ne forportos ĝin al miliciejo sed al O.K.K. La ruĝstelaj milicianoj anstataŭ ol difekti la serurojn por esplori, ĉu interne de l'valizo estas bombo aŭ infera eksplodilo, disponos pri elektronika aparato por detekti kio estas en valizo, kiun oni alportas. Kiam sur menuo estas skribite "rizo kun langustetoj" la kamarado kelnero ne servos al vi rizon kun unu sola griza kankreto, ĉar tio tute ne kongruas kun la fundamentaj principoj de memregada socialismo. Mi esperas, ke la abonantaro de ĉi gazeto estas sufiĉe juna por konstati la espereblajn progresojn.

La gazeto, kiun mi ĉiutage legis, estas organo de l'itala minoritato de Rijeka kaj Istrio. Antaŭ la milito loĝis pli ol 300 000 italoj. Kiam regis stalinista reĝimo, 90% forkuris. De tiam multaj revenis.

Vi eble rimarkis la belajn domojn de la centraj kvartaloj kun itala stilo. Estas aliaj minoritatoj : albanoj, hungaroj, turkoj, slovakoj, rumanoj, bulgaroj, eĉ germanoj. Ĉiu havas statuton : eĉ la ciganoj havas kiel ĉiuj siajn lernejojn, sian radion kaj televidon. Ne ekzistas senlaboruloj. Tiuj, kiuj devis migri en Amerikon aŭ en

Okcidenton, estas feliĉaj reveni al la lando. La federacia interlingvo estas la serbokroata lingvo : sama lingvo, kiu skribiĝas per du alfabetoj sekve de religiaj influoj : katolikoj uzis latinan skribon kaj la ortodoksuloj la cirilan rusan alfabeton.

Se la apotekoj estas malmultenombraj, oni ne povas kalkuli la multnombrajn trinkejojn, kiuj senpaŭze funkcias de l'frumateno ĝis la 22a precize. Oni trinkas bonajn aperitivojn : istrian konjakon aŭ prunalkoholon kun frukta limonado. La biero estas tiel bona kiel en (Germanio) (Bavario). Mi neniam renkontis ebriulon, dum ili svarmas en Skandinavio, kie la alkohol-konsumado estas kontrolata.

En la parto de Jugoslavio, kiun mi vizitis, oni manĝas bonege kaj mi rekomendas la bonan vinon de Istrio. Iam mi vizitis kun kamarado grandan magazenon. Ni ĉefe rimarkis la suban nivelon, kie estas ĉiuj nutraĵoj kaj mastrumproduktoj. Oni kredis esti en Francio, tamen la lesivoj kaj kafoj estas vendeblaj nur en paketoj ne grandkvante. Mi aŭdis ke Slovenio eksportas "Emental"-fromaĝon en Svisio... Oni eĉ vidis multajn varojn kun nomoj konataj en Okcidento, kiuj estas fabrikataj en Jugoslavio.

Mi devas paroli pri akceptado far de la Regiona Direktoro de la Fervojo. Kompreneble la jugoslava fervojo ne estas ŝtata administracio sed memmastruma entrepreno je ĉiuj niveloj kontrolata de la fervojistoj. La akceptado okazis en alta domo "Hejmo por gefraŭloj de l'jugoslava fervojo". Ĉiutage estas duŝoj kaj kuirejetoj, teretaĝe funkcias memserva restoracio, ĉio glatas laŭ metodo de l'memregado. Inter du aperitivoj, la Direktoro respondis al niaj demandoj pri diferenco inter manlaboristo kaj supera teknikisto. Mi notis, ke la jugoslava reto havas la plej fortan deklivon en la tuta Eŭropo : 25 p. 1000 (En Alpoj nur 12 p.1000), ke la fervojistoj emeritiĝas post 40 deĵorjaroj, kiam ili atingas la aĝon 65-jara... sed ili havas plibonigojn : almenaŭ 2 monatojn ĉiujare se ili serioze laboras. La lokomotivistoj ricevas kromajn plibonigojn, kiuj ebligas al ili emeritiĝi, kiam ili estas 50-jaraj.

Antaŭ nia disiĝo ĉiu partoprenanto ricevis memoraĵe de tiu akceptado belan insignon de la jugoslava fervojo. Estas baldaŭ la tempo por forveturo... Mi devas diri, ke mi promenadis ĉiumomente de la nokto tra Rijeka. Tion mi hezitus fari en iu ajn urbo de Francio la dolĉa. Se mi vidis skolt-

ojn, kiuj unuope marŝis malantaŭ la standardo de sia roto, vestitaj per la tradicia uniformo de Baden Powel (krom la ĉapelo), tio pruvas, ke la junuloj ne estas trudataj aniĝi al unika organizo. Se mi ne vidis junulojn, kiuj bruigas motorciklon kaj partoprenas la poluadon de l'aero, tio pruvas, ke oni rezervas la benzinon al tiu, kiu vere bezonas.

Jen ni estas en la relaŭto, kiu lasos nin en Pivka... Ĉiam gimnastiko por grimpi kaj malgrimpi... poste trajneto lasos la tutan grupon en Triesto, kie ni saltas sur trotuaron! Nia grupo disiĝas: la Nordanoj trafas trajnon al Parizo dum la Okcitanoj atendadas la trajnon, kiu lasos ilin en Marsejlo. Tio estis por ambaŭ grupoj kvazaŭ postkongreso tra Italio kun la espero havi la plezuron revidi nin en Annecy por la SAT-Amikara kongreso kaj en Bazelo por la 54a tutmonda SAT-kongreso.

Louis Pelletier.

\*\*\*\*\*

Ĉiam "Marĝene de la Rijeka Kongreso", kdo L. Pelletier poste sendis tiujn aldonajojn al sia ĉi-supra artikolo:

Oni povis rimarki, ŝpirante al insulo Krk, ke la solaj plezurŝipoj irantaj sur la maro, ne havas benzin-motoron. Ili moviĝas per silenta elektra motoro funkcia per akumulatoroj, kiujn oni povas interŝanĝi, kiam necesas, en speciala stacio. Pro tio la maro estas pura kaj konservas sian naturan odoron... Faru diferencon kun hispana, franca kaj itala marbordoj. Tie povas Jugoslavio esti ekzemplo....

Sur la ŝipo, la OKK-respondeculo pri kulturaj aferoj volis nepre instrui al mi sian kroatan lingvon... Konsiderante, ke mi venis en Jugoslavion por Esperanto, mi klopodis haste instrui al li la kongresan lingvon... Ni ambaŭ perdis: la sekvontan tagon mi ne plu bezonis kroati kaj nia simpatia krokodilanto ne plu bezonis ŝviti por parolnian sennaciecan, simplan, flekseblan, belsonan lingvon. La krokodiloj triumfis!

L.P.

R E S T A D O

G. Dumont

en Jugoslavlando - Julio 1980a

\*\*\*\*\*  
(2a parto)

**E**n Maribor, la 6an de julio, renkontiĝis la regiona esperistaro okaze de la 70a datreveno de la fondo en Slovenio de la unua E-grupo; mi estis invitita samkiel reprezentantoj de Aŭstrolando, Okc. Germanlando, kaj Itallando el kiuj troviĝis la sekretario de Itala Esp. Asocio kaj la sekretarino de ILEI, Kolegino Dazzini.

Horo de lokaj infanoj en landaj kostumoj kantis en Esperanto. La festo finiĝis per kantado de la "Espero" kaj "Internacio". Oni donacis aperitivan al ĉiuj partoprenintoj. Italaj kolegoj diris, ke lernejoj ferioj pro la voĉdonado okazis ĉi-jare de la 15a de junio ĝis la 31a de aŭgusto.

La loĝantoj de vilaĝo Podčetrtek estas tre aktivaj homoj. Sub gvidado kaj iniciato de la lernejestro por unuagrada instruado oni starigis muzeon en kaj ĉirkaŭ la lernejo, per ĉiuspecaj malnovaj iloj, instrumentoj uzitaj en la pasinteco, militistaj armiloj kaj ceteraj ekipaĵoj kaptitaj de la nazia malamiko bonorde prezentataj. Alegoria pulĉinelo el ligna trunko farita, branĉoj, ladboteloj, kaseroloj, ladskatoloj elvokas ĉe la loĝantaro neceson kaj devon teni la vilaĝon pura kaj bonorda. Lignaj trunkoj skulptitaj staras antaŭ la lerneja enirejo. Tute apude estas zooparko en kiu oni metis 2 aglojn, pavojn, turtojn, fazanojn, papagojn, kobajojn kaj vulpon de la loĝantoj donacitaj kaj kaptitaj. (\* sintakso! red.) Iun tagon mia esp. amiko kondukis min al Velenje, nun urbo de 25000 loĝantoj ĉirkaŭita de abiaj kaj fagaj arbaretoj kaj lupolejoj. Antaŭ la milito tie estis nur agroj kaj arboj. Li rimarkigis al mi gravan nombron de fumantaj kaj drinkantaj virinoj. Plejparte el ili estas laboristinoj spekulantaj je speciala libertempo (pli ol unujara) kun plena salajro pagata de sia laborejo. Plie, ili ricevas specialan monon por helpo je akuŝaj elspezoj.

La 12an de julio la hotela administrantaro aranĝis ekskurson al Kumrovec, naskiĝloko de forpasinta prezidinto Tito, situanta (la loko - red.) ĉ. 15 km. for de la hotelo. Ni vidis la domon, en kiu naskiĝis la patrino de Tito. Sur tiu loko nun staras unuagrada lernejo. Dum nia halto alvenis

autobuso kun ĉ. 40 gejunuloj portantaj flagojn, picĉojn, ŝovelilojn, dikajn ferajn stangojn. Ili grupiĝis laŭ 2 vicoj, kantis kaj kriegis sian ĵurvorton imiti ekzemplon de sia majstro Tito, kiel li labori por la popolo. Tuj poste kaptinte la ilojn, ili direktis sin al sia laborloko por plenumi laborojn farendajn de volontulaj brigadistoj. Ĝenerale ili faras publikajn servojn : parkojn, ĝardenojn, vojojn, kc. Kvankam tiuj laboroj plenumiĝas senpage, la kostoj estas pli altaj ol por tiuj farataj de spertaj laboristoj, samkiel ankaŭ en Albanlando. Per ili oni ne celas ŝparon ; nur alkutimigi tiujn laborulojn - plejparte gestudentoj - al produktiva laboro, forpeli for de siaj mensoj malestimon al manlaboro kaj manlaboruloj, spiritostato penetranta en la cerboj de intelektularo kaj burokrataro.

Tito naskiĝis en tre modesta dometo, nun iĝinta muzeo, en kiu prezentataj estas liaj lulilo, lito, knedujo, bakforno, kuirforno, unu tablo, kelkaj seĝoj, forĝistaj iloj uzitaj dum lia metilernadperiodo, segilo kaj hakilo por disfendi brullignon. Sur paneloj ordigitaj en la kuirejo oni traktas pri siaj travivaĵoj kaj okazintaĵoj dum lia vivperiodo : naciliberiga batalo kontraŭ naziaj invadintoj, lia politika rolo en Jugoslavlando post la liberigo, movado de nealianciĝintaj ŝtatoj, kc.

La 18an de julio je la 6a matene mi forlasis la hotelon por veturi al Rijeka, ĉe Adriatika Maro, trans Celje, Zidani Most, Ljubljana, Pivka (299 km). En Celje mi aĉetis vojaĝbileton, kiun mi pagis 97 din. Mi atingis la cellokon, kongresejon de la 53a SAT-kongreso, ĉ. la 3an posttagmeze. La unuan nokton mi kundormis kun sveda kongresano en luksa hotelo, en kiu ĉiu el ni pagis 400 din. Poste oni loĝigis min ĉe privatulino en antaŭrezervita ĉambro kun 2 Parizanoj kaj ni pagis 200 din. tage kaj persone. La kongresejo estis nur kelkajn centmetrojn for de la loĝejo, ankaŭ proksima al la maro.

Dum en Podĉetrtek la vetero estis suna matene kaj pluva posttagmeze, en Rijeka regis varma vetero.

Ni estis 380 gekongresanoj el 18 landoj, ĉiam interparolantaj nur per la internacia lingvo Esperanto. Fortradukistojn kaj tradukmaŝinojn ! Kiel ĉe ĉiuj kongresoj la organiztekniko ne estis perfekta, tamen akceptebla. Meze de ĝoja etoso ni disigis post aprobo de rezolucio favora al paco, entiro de junuloj en la Plenum-Komitato,

pli streĉa kunlaboro kun aliaj E-organizoj. Inter du kunsidoj oni bonvenigis nin en memfunkciigata metiista entrepreno por ekipado de konstruataj domoj (fakoj ligna, metala kaj elektra). Ĉiu metiisto laboras unuope, helpate aŭ ne de salajrata laboristo. Kiel membro de la Kooperativo, la metiisto ricevas necesajn krudmaterialojn, ilojn, instrumentojn, maŝinojn bezonatajn pere de liverantoj, kun kiuj la kooperativo faris interkonsenton pri difinitaj kondiĉoj. La direktistaro sendas la kolektitajn mendilojn al la liverantoj, disdonas la taskojn al la diversaj metiistoj, ofertas servojn al la klientaro kaj certigas kontraktojn kun entreprenoj por efektivigotaj laboroj. Speciala banko zorgas pri investoj, impostoj, salajroj, kotizoj kaj diversaj asekuroj, dispartigo de profitoj, ktp. La kooperativanoj elektas inter siaj kolegoj mastrumadkonsilion administrantan kune kun la direktisto. Pere de delegitaroj tiu konsilio debatas regularojn pri funkciado kaj kunordigado sur la loka, regiona, respublika kaj federacia niveloj, aplikado de ŝtataj sociaj leĝoj koncernantaj ankaŭ malsanojn, naskojn, feriojn, akcidentojn, ktp. Post depreno de la elspezoj kaj de la mono antaŭvidita por venontaj investoj, okazas la dispartigo de la profito al ĉiuj membroj kaj al la salajruloj. En la sidejo de la entrepreno funkcias manĝejo kaj trinkejo por la membroj kaj la tuta personaro. Mi faris demandon, por ke oni bonvolu informi nin pri la flankenmetitaj fondusoj rilate funkciadon de profesia kapabligo de junuloj. Oni respondis : "La junuloj ne volas labori ; sekve ni ne bezonas antaŭvidi sumon por tiu celo." Kelkajn tagojn poste la vicdirektisto de la regiona fervoja servo akceptis la fervojistojn-kongresanojn, proksimume 20 personojn ; tiam oni interparolis pri diversaj sociaj kaj trafikaj problemoj en la 15a etaĝo de domo, el kiu eblis superrigardi gravan parton de la urbo. Oni diris, ke, estontece, oni ne konstruos tiom altajn domojn nepraktike uzeblajn laŭ oportuna vidpunkto. Je la 11a matene oni servis al ni aperitivan el konjako kun malvarmega minerala gasa akvo. Tre bongusta trinkaĵo. Poste oni montris al ni en la sama konstruaĵo hejmon por gefratlaj pensiuloj, en kiu ili duope kunloĝas. Ĉiu posedas en la ĉambro sian propran liton. La ĉambro estas krome ekipita per necesejo, duŝejo, tualetejo, ŝranko, tablo, kelkaj seĝoj. El ĝi eblas superrigardi gravan parton de la urbo. Ĉe la etaĝo estas instalita forno por pretigo de

mangaĵoj kaj trinkaĵoj laŭvole. Ĉiu pagas 10% de siaj en-  
apezoj por ĉiutaga plena pensiono. Permaŝine funkciigata  
lavejo estas apude.

En la urbo eblas manĝi pagante 60-80 din. Ĝenerale la  
mangaĵo konsistas el supo, viando kun legomoj en saŭco,  
deserto kaj glaso da biero aŭ vino.

Multaj gejunuloj fumas kaj drinkas. Sanitaraj servoj  
plendas pro tio, precipe koncerne gravedajn inojn. Laŭ  
oficiala enketo tiu konduto grave damaĝas sanon de nask-  
itaj infanoj.

Dum kongresa kunsido de la E-junularo la kroata sekcio  
raportis pri siaj laboro kaj atingoj. Mi kaptis la okazon  
por demandi pri rezultoj akiritaj de la internaciaj volont-  
ulaj laborbrigadoj, en kiu en la E-grupo partoprenis proks.  
80 gejunuloj, ankaŭ el Okc. Eŭropo. Oni respondis, ke  
laborbrigadoj adas funkcii sen partopreno de Okcidentanoj,  
tial ke ĉi-lastaj nealkutimiĝintaj al tiuj penigaj laboroj  
senmaŝine plenumataj perturbas la ritmon de ceteraj labor-  
antoj, kio rezultigas misvolviĝonde la laboro. Sur tiuj  
laborejoj oni laboras dum 7 horoj tage. La brigadanoj  
ricevas 3 mangaĵojn tage, laborvestaĵojn. Ili ĝuas distrajn  
vesperojn kaj havas senpagajn ekskursojn sabate kaj diman-  
ĉe.

Per tiuj kelkaj informoj neblas havi definitivan opi-  
nion pri la ĝenerala situacio en tiu lando. Tamen ili ebl-  
igas iom lumigi la okazantaĵojn en socia kaj ekonomia  
kampoj, pri kiuj niaj radio, televida kaj gazetara servoj  
silentas. Eblas kompari, ĉu Jugoslavlanda regado estas por  
la popolo pli avantaĝa ol tiu travivata de ni; ĉu tiu  
ŝtato donas al sia popolo pli altan demokratian nivelon  
ol tiu atingita ĉi tie. Per tiaj informoj niaj laborulaj  
organizaĵoj kapablas starigi pli adekvatajn postulojn por  
plibonigi la sorton de nia enlanda laborularo.

Estus konsilinde, ke ĉiuj feriantoj faru raporteton je  
siaj rehejmiĝoj pri kuriozaĵoj, rimarkoj rilatantaj soci-  
ajn kaj ekonomiajn fenomenojn nekutimajn en iliaj loĝlokoj  
dum restadoj en alia landparto aŭ eksterlande.

Tiu enketeto farita dum libera tempo post la kuracado  
en la hotelo kaj ĉeesto ĉe la kongresaj debatoj estis ebla  
dank'al afabla helpo de Montenegrano scipovanta la rusan  
lingvon kaj lia slovena edzino parolanta la germanan. En  
Rijeka, kompreneble, Esperanto estis nia ĉiama komuna

(fino sur la apuda paĝo)

TRA EŬROPO per FERVOJO  
kaj ESPERANTO ... (daŭrigo)

Wambierzyce  
\*\*\*\*\*

Post la ŝtatlimaj formalizaĵoj, jen mia unua kontakto kun  
Pollando: marŝado sur neĝokovrita strato de montoj sudetaj,  
inter la kvara kaj la kvina horoj de decembra nokto. La pej-  
zaĝo estis tia, ke mi kredis min en feinfabelo. Eble tio  
estas mia plej bela memoraĵo pri Pollando. Poste mi skribis  
al miaj gepatroj, ke Eŭgeno atendis min en Klodzko, kaj ke  
mi bone alvenis en Wambierzyce, sed ne menciis detalojn.

Vekiĝante, mi rigardis, kie mi estas. Eŭgeno vivas kun  
siaj gepatroj, sed ili okupas la teretaĝon de la domo, kaj  
li havas ĉambron kaj salonon en la supera etaĝo. La ĉambro  
estas ornamita per tri grandegaj bildoj, kiuj reprezentas la  
Dipatrinon kun ŝia infaneto, la sanktan koron de Jesuo kaj  
la senmakulan korpon de Maria. Sur alia muro de la ĉambro  
estas alia bildo, malpli granda, kiun Eŭgeno ricevis por sia  
unua komunio. La tuto estas en stilo, kiu ridigus ĉiujn  
francajn katolikojn aĝantajn malpli ol 60 jarojn, kaj duonon  
de tiuj, kiuj aĝas pli ol 75 jarojn. En la noktotablo estas  
kompleta biblio, eldonita en Pollando en 1960, kaj en la  
ŝranko estas meslibro. Sed poste Eŭgeno montris al mi, ke  
krom la meslibro estas en la ŝranko ankaŭ pornografiaj bildoj.  
Seniluziigis lin mia aserto, ke la subskribaĵoj de la bildoj  
ne estas en franca, sed en angla lingvo, kaj li kolere mal-  
benis la vendinton, kiu asertis al li, ke la pornografiaĵoj  
estas francaj, do superaj. En la salono estas sur tableto  
bildeto de la papo, sed la ĉefa vidindaĵo estas sur muro la  
vidkartoj, kiujn Eŭgeno reportis de siaj vojaĝoj en aliaj  
\*\*\*\*\*  
Restado en Jugoslavlando (fino)

interkomunikilo. Bezono pri komuna tutmonda lingvo fariĝas  
pli kaj pli urĝa tasko de niaj landaj kaj internaciaj organiza-  
aĵoj kaj oficialaj instancoj por la bono de la homaro. Tiu  
atingo estas aparta devo de ĉiuj en plenumo de Helsinkia  
interkonsento.

Oktobero 1980a. G. Dumont.

landoj : li turismis ĉefe en Bulgario, kaj li vizitis parencinon en Stuttgart, en Federacia Germanio. Ĉe la teretaĝo mi ne vizitis ĉiujn ĉambrojn, sed nur la ĉambro, kiu utilas kiel manĝoĉambro, kuirejo, kaj ankaŭ banejo, ĉar banejo ne estas : la patrino de Eŭgeno metis kaldronon sur la grandan fornon kaj, kiam la akvo bolis, ŝi donis al mi pelveton, kaj tiel mi min lavis. Mi ne miris, ĉar estis la vivnivelo, kiun mi konis antaŭ 20 jaroj en la vilaĝo de mia parencaro. Antaŭ 20 jaroj, ĉe miaj geonkloj, la necesejo estis ekstera, funde de la ĝardeno. Ĉe Eŭgeno, ĉar vintro estas pli akra en Sudetoj ol en Burbonio, necesejo estas interne de la domo, sed sen akvoŝprucilo, kaj kun planko el tero.

Post mia tualetto, la patrino de Eŭgeno preparis al mi matenmanĝon : teon kun kampara lardo. Alvenis la patro, kaj ni povis konversacii, ĉar li tre bone parolas la germanan lingvon. La patro de Eŭgeno sciis, ke Strasburgo estas granda urbo franca ĉe Rejno, tio surprizis lin multe malpli ol la junan sinjoron Schmudermeyer, ĉar dum sia longa vivo de sudeta polo multon li spertis. Ankaŭ ne tre mirigis lin miaj informoj, ke Elzaco-Loreno ne ekzistas pli reale ol Ĉeĥo-Slovakio, kaj ke en Strasburgo ankoraŭ komprenata estas la germana lingvo, kvankam de germanoj estas ŝatataj nur la markoj. Eŭgeno revenis, kaj demandis min, ĉu vere lia patro bone mastras la germanan lingvon. Surprizis lin mia jesa respondo. Li montris al mi grandan mapon de Eŭropo, petante, ke mi montru al li, kie estas Strasburgo, sed mi ne facile trovis, ĉar la mapo estis rusa kaj la nomo Strasburgo mi ne povis rekoni en cirila alfabeto. Fine mi trovis Karlsruhe, kaj diris, ke Strasburgo estas apude. Eŭgeno miris, ke franca urbo povas esti apud germana urbo, kaj mi respondis, ke post Karlsruhe necesas nur plu trovi Rejon, kaj ke poste oni tuj vidos Strasburgon. Eŭgeno demandis min, ĉu, kiam li vizitos min en Strasburgo, li devos ŝanĝi trajnon en Parizo, kaj mi mire demandis, kion do li volas fari en Parizo por iri de Pollando al Rejno. Poste mi reparolis pri tio kun lia patro, kaj konstatis, ke la maljunulo havas pli klaran konon de rejna geografio, ol havas la junulo. Ni interkonsentis, ke dum sia restado ĉe mi, li vizitos la parencinon en Stuttgart. Eŭgeno demandis min ankaŭ, ĉu Lourdes estas proksime de Strasburgo, kaj malĝojis pro mia nea respondo.

Post tiuj geografiaj konsideroj, ni vizitis la vilaĝon Wambierzyce. Ĝi estas montara vilaĝo, kaj vidindaĵoj estas kastelo kaj grandega baroka preĝejo. Eŭgeno montris al mi ankaŭ la krucvojan monumenton : ĝi konsistas el ŝtuparo skulptita en flanko de la montaro, kaj ĉiu stacio de la pasiono de Jesuo estas reprezentita per pluraj statuoj. Mi miris pro la ĉeesto de tiom granda monumento en tiom malgranda vilaĝo. Ni vizitis la pastron, kiu montris al mi serion da aŭtomatoj konstruitaj de ĉeĥa artisto : scenoj estas ĉerpitaj el la Biblio, escepte de la du lastaj, kiuj reprezentas la vivon de ministoj en la montaro, kaj la silvestran dancadon en sudeta vilaĝo.

Post nia reveno en la domo, Eŭgeno diris, ke li iras al la uzino de radioaparatoj, kie li laboras, ĉar, kvankam li ferias, li havas malgrandan laboron farotan por si mem. Li diris, ke lia patrino alportos la tagmanĝon. Je la tagmezo mi ĝin atendis, sed nenio venis. Ĉar mi ne volis esti malĝentila, mi plu atendis, kaj je la tria horo alvenis kokid-aĵo kun legomoj. Eŭgeno revenis kaj je la kvina horo li diris al mi, ke estas la tempo vespermanĝi. La patrino alportis kamparan lardon kaj panon, kaj Eŭgeno miris, ke mi apenaŭ tuŝis la lardon. Vespere mi povis aŭdi la informbultenon de France-Inter per lia moderna radioaparato. Poste ni interparolis. Eŭgeno surpriziĝis, ke mi ne volas resti en la vilaĝo, sed mi diris, ke Walter atendas min por la 22a de decembro vespere en Rzeszow. Fine ni konsentis, ke mi restos en Wambierzyce ĝis la 22a vespere, kaj alvenos en Rzeszow nur la 23an matene. Mi diris ankaŭ, ke antaŭ ol mi forlasos Wambierzyce, mi devos iri al la polico. Eŭgeno respondis, ke tio ne utilas. Mi rebatis, ke laŭ la informilo donita al mi de la konsulejo de Pollando en Strasburgo, tio estas deviga, kaj ke mi vidas nenion strangan en tiu regulo, ĉar estas same en aliaj socialismaj landoj. Sed Eŭgeno miris, ke pro troa laceco mi ne insistis.

La sekvintan matenon, post lardomanĝo kaj tualetto, mi re-diris al Eŭgeno, ke mi devas iri al la polico. Eŭgeno demandis, kion mi volas ĉe la polico, kaj mi respondis, ke volas mi nenion, sed ke estas leĝo de la Pola Popola Respubliko, kaj ke, kiam oni estas alilanda en socialisma lando, prefere oni havu siajn paperojn en ordo. Li diris, ke ne estas polico en Wambierzyce, kaj mi respondis, ke ŝajne en Pollando, male



de aliaj socialismaj landoj, oni povas sin prezenti al iu ajn policejo aŭ milicejo, kaj ke mi ankoraŭ neniam vidis unu eron de nia kompatinda planedo, pri kiu kompetentas neniu policejo. "Jes, diris Eŭgeno, pri vilaĝo Wambierzyce kompetentas la milicio de Radkow". "Do, mi diris, ni iru al Radkow." Eŭgeno konsentis, sed, antaŭ ol ni povis iri, alvenis du kolegoj. Kiel postulas gastemo, li proponis al ili vodkon, kaj dum horoj la tri junuloj nur babilis kaj drinkis. Ili tiom insistis, ke mi drinku kun ili, ke mi eĉ demandis min, ĉu la vodkon mi overŝu sur la tablotukon, por ke ili lasu min trankvila pri ĝi. Tamen fine, pro la argumento, ke mia medikamento estas tute neakordigebla kun alkoholo, ili ĉesis insisti, kaj nur kompatis al mi.

Ankaŭ en la vilaĝo de mia parenco mi ofte havis problemojn pri la franca alkoholismo. Sed en Pollando la problemo estas 30° pli grava, kaj mi ne estas memmortigema. Ĉar mi komprenis nenion de tiu konversacio en la pola, mi petis tradukon, kaj Eŭgeno diris, ke ili parolas pri politiko, kaj ke ili opinias, ke baldaŭ estos milito. Eŭgeno montris sian pasporton al la kolegoj. Mi proponis montri mian, kaj ili tre miris, ke pasporton mi ricevis origine por 5 jaroj, ke oni renovigis ĝin rapide, ne tro koste, kaj sen demando, kien mi volas iri. Post la tagmezo, drinkinte multe da vodko, la kolegoj forveturis per buso, kaj per alia buso ni veturis al Radkow. Mi diris al Eŭgeno, ke, en la vilaĝo de mia parenco, traktoroj anstataŭas ĉevalojn, la domoj estas nun pli komfortaj, sed buso estas unu en la semajno, kaj ne pluraj en unu tago, kiel en Wambierzyce, tial necesas havi privatajn aŭtomobilojn. Eŭgeno diris ke, kiam li estos ĉe mi en Strasburgo, li laboros, aĉetos brokantan aŭtomobilon, kaj veturos per ĝi al Pollando. Mi rebatis, ke dum restado de 8 tagoj ne eblas havi paperojn en ordo por aŭtomobilo, kaj ke labori li ne faros, unue ĉar tion ne permesos lia restadpermeso, due, ĉar laboro ne estas en Francio jam por francoj. Eŭgeno diris, ke li aŭdis ĉe la pola radio, ke estas en Francio unu miliono kaj duono da senlaboruloj, sed ke tio estas nur propagando de komunistoj. Mi respondis, ke la informo estas vera, sed ĝin li ne volis kredi.

(pludaŭrigota...)

Jakelino

## JUS APERIS

Studoj pri la esperanta literaturo

\*\*\*\*\*

Vilmos Benczik. Eld: La Kritikanto

Recenzi estas laŭesence malfacile sed kiam, pri kritika verko, kiu komence substrekas la "teruran respondecon" kaj ofte la "mankon de kompetento" de la recenzisto, estas tre maltrankvilige...

Tamen mi kuraĝas diri, ke la titolo bone prezentas la enhavon de la verko.

Komence klariĝas la senco de la fakaj vortoj. Pri ĉiu verkisto, estas prezentado de la homo, de la medio, de la epoko kaj de la diversaj tendencoj literaturaj, politikaj, k.t.p. kaj ankaŭ de la valoro kaj influo de la verkoj en la movado. El tiu lasta punkto, per rekta senkompleza takso, eĉ kontraŭ vivantaj homoj, fontas trafaj konsideroj pri la lingvo, ĝia evoluo (en ĝi estas neutiligataj riĉaĵoj, kiuj efike anstataŭas neologismojn), ĝia rolo (krei literaturon por krei "popolon") kaj pri la esperanta literaturo. Tiu ĉi havas gravan taskon: evoluigon kaj disvastigon de la lingvo, kontentigante la estetikajn bezonojn, celante internaciismon kaj humanismon. Povus helpi:

- bona literatur-historio, kiu ĝis nun estas nur nomenklaturado de verkoj kaj aŭtoroj;
- ebla helpo de UEA ebligante aperon de aparte gravaj verkoj koncerne la esperantan kulturon.

La studoj rilatas al: Henri Vallienne, Heinrich August Luyken, Stanislav Schulhof, Julio Baghy, Emba, Ferenc Szilagyi, al la Kvaropo: William Auld, John Sharp Dinwoodie, John Islay Francis, Reto Mario Rossetti, kaj Sandor Szathmari, Victor Sadler.

Kelkaj koboldoj enŝoviĝis; ekz. 24a p. ... "financas la revuojn, eldonejojn, per ĝiaj kanajloj la verko atingas la leganton."

Sed bonaj estas la presado kaj prezentado. (141 paĝoj).

G. Roux.

Mendi al: Japana Esperanta Librokooperativo, Toyonaka-si, Sone-higasi 1-11-46-204, 561 Japanio. Prezo: 39 FF.

## Feliĉlando

Memoraĵo de  
maljunulo.

Kiam oni maljunas, oni rakontas memoraĵojn.  
...Iam ni travojaĝis dornejojn, regionon sen mono, sen polico, sen ĝendarmaro aŭ deputito, ministro aŭ alia administraĵo, sen telefono, sen aŭtomobilo, kun indiĝenoj, analfabetoj, sen atesto de naskiĝo aŭ pasporto kaj aliaj inventoj de nia nuna vivmaniero.

Ilia estro estis la Sorĉisto. Li estis ilia kuracisto, makleristo inter la popolo kaj la supozaj najbaroj en ĉielo - nomitaj Dioj - kiuj sendis sunon, pluvon aŭ sanon, ne kiam oni tion bezonas, sed kiam ili bonvolis tion sendi.

La sorĉisto estis ankaŭ juĝisto - por vivo kaj morto - de ĉiu kaj ĉio.

Nia konversacio limiĝis per signoj de manoj, komplike sed sufiĉe. Li estis interesata pri la lumo, kiun oni povas tuŝi per la mano sen sin bruligi... kaj proponis al ni interŝanĝe... laŭ nia elekto... grandegan gregon da malsovaĝaj hejmaj bestoj...

Dum instalado de nia ventenergia elektra generatoro, mi rimarkis, ke iu homo, "sovaĝulo", komprenis miajn parolojn inter mi kaj mia helpanto.

Mi invitis tiun sovaĝulon per mansigno iri supren al la turo, kiun mi muntis per bambus-bastonoj, sur kiuj mi instalis fine la alojn de nia generatoro.

Kiam li estis alveninta al la supro, mi lin demandis - dum mia laboro - kial li ne rolas kiel tradukisto inter ni kaj la sorĉisto ?

La sovaĝulo min respondis, ke se la sorĉisto sciis, ke li scipovas nian (neesperantistan) lingvon, li tuj lin mortigus kaj manĝus, por gluti la scion de la alia lingvo. Ĉe ili oni devis manĝi ĉiun superan homon por amasigi en sia korpo la talenton de alia superulo.

Per tiu respondo mi komprenis ilian kanibalismon kaj en sama tempo, ke mi devos estontece atenti pri mia propra vivo kaj ankaŭ pri tiuj de nia tuta grupo...

Pro tiu motivo, post la fino de nia laboro, ni elturniĝis por vidigi, ke la lumo funkcias, nur unu momenton, sed ke ni bezonas reiri por fini... Dank'al ĉi tiu ideo ni povis foriri kun duono da bestaĵo kaj ne plu reveni...

## NIA FELIETONO

Antaŭ 50 jaroj... TRA LA MONDO  
PER BICIKLO KAJ ESPERANTO

... Ĉe miaj piedoj, maldekstre, la vastega, laga "maro", kies norda rando malaperas en la malpeza nebulo ; antaŭ mi kaj dekstre, belegaj neĝoplenaj montpintoj, kaj ĉe ties malsupro la reloj, kiuj brilas sub la leviĝanta suno. La akvo estas nekredible klara, tiel ke ofte mi ekvidas la plurmetre profundan fundon kaj fiŝarojn el ĉiuj dikecoj. De fore ĝi havas belan smeraldan verdon. Sur la lagbordo kreskas nekredible densa flaŭro prisemita de dometoj.

Ĉiun 20an aŭ 30an kilometron, mi malkovras elegantan kaj florormamitan stacieton. Ĉiam aklamas min la randanoj avertitaj pri mia alveno.

... Tia estis dum du neforgeseblaj tagoj mia promonado rande de la sudorienta parto de Bajkalo, en tiu belega regiono, kiun prilumis bela aŭtuna suno. (Post duonmonato aŭ tri semajnoj la lago estos glaciiginta)...

Lundon 4an de novembro 1929 : ĈITA.

De kvin-ses tagoj mi estas tie, vane klopodante por akiri vizon por Manĉurio. Ĉiam minacas konflikto ĉe la manĉuria limo. Oni minacas repeli min al Irkutsko, ĉar en Ĉita troviĝas ni en landlima, konflikta regiono. Eĉ per fervojo, en la sovetia regiono, kiu laŭas la riveregon Amur, oni rifuzas allasi min ĝis Vladivostoko. Ĉu tiu nova obstaklo devigos min rezigni iri pli malproksimen ?

Irkutsko, 10an de novembro

Ĉio havas finon, eĉ la festoj. Jen nun la alia flanko de la medalo. Pli la eventoj ol la homoj devigis min retroiri. La ĉina-rusa milito minacas ĉe la orienta landlimo. Se tiu konflikto estis preskaŭ nekonata en Okcidento, tie ĉi ne estas same. Ĉiutage la radio lokas ĝin je la unuan vicon. La Ĉinoj postulas la tutan sovetian orienton kaj pli konkrete la suverenecon super la manĉuria fervojo, kiun mastras Sovetio. Malantaŭ tiuj postuloj profiliĝas la japana imperiismo, kiu jam okupas Manĉurion. Kiel naturajn aliancanojn Japanio havas

ĉiujn elmigrintojn de la eksa reĝimo, kiuj, de Ĥarbino ĝis Pekino tra Ŝanhajo, vete komplotadas.

Mia situacio fariĝas neeltenebla. Mia retroiro estos aventuro kaj stranga nekonataĵo. Unue pri la gastado? Mi ne plu estas fama turisto, sed fremda suspektato...

13an de novembro : Ŝovinisma vento blovas en Irkutsko nun. La situacio pligraviĝas ĉiutage. La instancoj zorgantaj pri vizado de la pasportoj, informis min, kiel en Ĉita, ke mi devas TUJ reiri al Francio. Oni pretekstas, ke mi uzurpe uzis la permeson ruliĝi sur la fervojo. Feliĉe la esperantista grupo ekzorgas pri mia afero. Morgaŭ ni turnos nin al aliaj instancoj...

Merkredon 20an de novembro 1929. Novosibirsko :

Mi havis apenaŭ la tempon peti kaj akiri fervojan rabaton - kio pruvas, ke la instancoj tamen ne tro koleras kontraŭ min - kaj mi devis retrovojaĝi okcidenten. Mia pertrajna vojaĝo daŭris 48 horojn inter Irkutsko kaj Novosibirsko, dum mi bezonis du monatojn por trabicikli la saman distancon.

Hieraŭ, alvenante tie ĉi, mi retrovis ĉion en bona ordo. Neniu porciumado, do, la normala vivo! Mi pli trankvile spiras, sed kion mi perdis?

... Mian monujon dum la vojaĝo.

Irkutsko, la 8an de decembro 1929

Fine mi sukcesis akiri restadpermeson por Irkutsko, kie mi troviĝas de post la monatkomeno. La malvarmo nun estas tre akuta, de minus 25° ĝis minus 30°, kio devigas min resti interne preskaŭ la tutan tempon. Provizore mi loĝas ĉe familio M. Mia nura distro estas kino. Mi petis pri loĝejo kaj laboro, kaj mi atendas.

Fine, ekde la 9a de novembro, mi eklaboras en uzino kiel ĉarpentisto. Malgraŭ la malvarmo zinkistoj kaj ĉarpentistoj laboras sur la tegmentoj. Inter la laboristoj troviĝas ankaŭ virinoj. Je la 16a, anstataŭ ellasi nin, oni fermas la pordojn por devigi la laboristojn ĉeesti kunvenon, kie la direktoro plendas pri la rendimento.

Ĉiutage en la manĝejo paroladas oratoro. La malvarmo atingas minus 40°. La stadiono estas transformita en sketejon. Mia nazo frostiĝis plurfoje!

(daŭrigota)

Alfa-Beta.

## NIA DEBATO

Respondo al Jakelino (Laŭte n-ro 29)

"Kiel Esperanto povas utili?"

Mi grandparte konsentas kun Jakelino, tamen kelkaj punktoj el ŝia analizo tiklis min - precipe rilate la manieron pri-trakti la celojn de respektive SAT kaj SATamikaro. Ŝajnas, ke ŝi (kaj multaj aliaj - eĉ SATanoj, ve!) miksas ambaŭ asociojn.

Fakte, se SAT (PER-Esperanta asocio) estas bone lokita ĉe la dua nivelo, male, rifuzi lokon al SATamikaro ĉe la unua estas erari: SATamikaro ja estas POR-Esperanta asocio, kaj tial, ne estas kontraŭnature, ke ĝi eldonas lernolibrojn.

Sed SATamikaro ne estas nur poresperanta asocio, ĝi celas ankaŭ varbi al SAT - kaj tial, ne estas neŭtrala. Bedaŭrinde, ĝiaj lernolibroj ne spegulas tiun ne-neŭtralecon, kaj mi konsentas kun Jakelino - sed ne pro la samah motivoj: Estas (eble ne stulte, sed) konsterninde, ke UFE uzas SAT-amikarajn lernolibrojn: tio eble montras, ke ili estas bonaj, sed precipe, ke ili estas, antaŭ ĉio, neŭtralaj (por ne tuj diri, ke ili spegulas la regantan ideologion).

Nu, kial verki kaj eldoni "neŭtralajn" lernolibrojn, kiam oni estas mem neŭtrala? Ĉu oni kredas, ke instruado povas esti "neŭtrala"? Tion, ŝajne, kredas Jakelino. Ja ĉefministro kaj manlaboristo uzas la saman gramatikon, sed ĉu lernado de lingvo povas resumiĝi al lernado de gramatiko? Certe ne, kaj cetere, neniu lernolibro - eĉ esperanta - faras tion.

Kiel ajn oni elturniĝas, oni vole-nevole enkondukas ideologion, eĉ en la plej banalan banalaĵon.

Vidu ekzemple la Junulkurson. Laŭlonge de la metodo, oni studas la aventurojn de Karlo kaj Johanino. Jen du geknaboj, kiuj povas pagi al si vojaĝon per trajno, ŝipo, aviadilo, ĉirkaŭ la mondo, kiuj povas ekskursi helikoptere super Novjorko ktp. La homoj, kiajn ili renkontas, utilas nur por prezenti al ili vidindaĵojn - la plej ŝablonajn.

Per tia banala rakonto, verŝajne oni provis verki "neŭtralan" tekston. Fakte oni sukcesis verki nur burĝecan

rakonton : temas pri turismo (kun iom duba ekzotismemo) por monhava junularo. Por progresigi la mensojn, mi dubas ĉu tiu rakonto helpas. La fakto, ke tiu Junulkurso direktiĝas al junuloj, ne estas senkulpigo - male - junularo estas ideala tereno, por ke progresu la mensoj. Mi tute ne postulas, ke oni trude encerbigu maldekstrajn sloganojn por ilustru gramatikajn regulojn, sed ŝajnas al mi, ke ekzemple dum sia vojaĝo Johanino kaj Karlo povus ankaŭ renkontiĝi kun mizeruloj (estas strange, ke ili nenie spertis tion, kvankam 3/4 el la popoloj vivas en tiu stato).

En la Nova Racia Kurso estas la samo. Etburĝa idealo subtenas la tuton. Ĉiuj havas sufiĉe feliĉan vivon, komfortan domon kun televido, ĉio estas plej bona en la plej bona mondo - mizero, senlaboreco ne ekzistas, familio (kun legaj geedzoj, kompreneble) etburĝe plu familias, kaj kompreneble la patro legas la ĵurnalon dum la patrino trikas, kio estas ja ilia natura rolo. (Notu, ke la unua leciono lernigas al ni la familion de A ĝis Z, ĉar kompreneble por enpaŝi en lingvo-studadon, oni nepre konu tuj la sankte sanktan Familion de la pra-avo ĝis la pra-bo-kuzo.).

Kvankam grandparte ekstermoda (laŭ formo kaj ideoj), lernolibro kiel "PETRO, lernolibro por laboristoj", ŝajnas al mi multe pli SATeca. En ĝi oni ne rifuzas, ke homoj estu kelkfoje malbonaj, malbelaj, ke domoj estu malkomfortaj, oni eĉ povas esti senlabora kaj viziti malliber-ejon.

Moderna lernolibro SATeca restas por fari. Neŭtralismo ne eblas, eĉ (precipe?) en lernolibroj. Ni estu konsekvencaj. Interesatoj, kiuj pretas kunlabori, sin turnu rekte al mi.

H. ELIK  
16 chemin de l'Abbaye  
F 74000 ANNECY le Vieux

\*\*\*\*\*  
La venonta numero de "Laŭte!" aperos jam  
en la unuaj tagoj de decembro.  
Z-taganoj profitu tion por akurate informi  
pri la programoj de la 14a de dec. !  
\*\*\*\*\*

Ĝardeneto de la Senkulpuloj  
\*\*\*\*\*

Kiam la najbaro frapis sian edzinon,  
Mi ne volis enmiksiĝi en liaj aferoj.

Kiam oni kontrolis la nigrulan studenton en la subtera vagonaro,  
Mi marŝis pli rapide.

Kiam ili frapegis Mohamed,  
Mi pensis : estas sendube pravigo.

Kiam ŝi kriis pri seksperforto sub mia fenestro,  
Mi laŭtigis la sonon de mia radio-aparato.

Kiam ili rakontis la lastan belgan rakonton,  
Mi ridis kun ili.

Kiam ili maldungis mian samseksaman kolegon,  
Mi ankoraŭ nenion komprenis.

Kiam ili pentris naziajn simbolojn sur la butikoj en la teretaĝo,  
Mi deturnis el ĝi mian rigardon.

Kiam maldekstra partio forpelis la haŝiŝ-fumantojn kaj denunciis la malesperemulojn,  
Mi ne resendis mian aliĝkarton.

Kiam ili elpelis la advokaton,  
Mi opiniis : li estis do kulpa !

Kiam ili "punis" la prostituitinon en la proksima kafejo,  
Mi diris : ŝi ĝin meritis.

Hodiaŭ  
ili venas serĉi min  
kaj ne plu estas iu por min defendi.  
Mi tamen estas senkulpulo.

El la franca gazeto "Libération", post la eksplod-mortigo ĉe la Pariza juda preĝejo.  
komunikis J.G.

\*\*\*\*\*  
Directeur de publication: Simonet \* Commission paritaire  
Imprimeur: Baudó, F 47340 Laroque \* n° 58 651

36<sup>a</sup> SAT-Amikara Kongreso : DULAGA KONGRESO  
La venonta kongreso de SAT-Amikaro okazos en  
A N N E C Y (Pasko 1981)

pli precize en St JORIOZ, apuda urbeto, super la lago de Ancecy, fronte al la 'TURNET', plej alta monto de la lag-regiono.

La kongresejo estas moderna, granda kaj komforta domo, specialigita en akceptado de kongreso, tio signifas, ke ne nur laborkunsidoj okazos inter ĝiaj muroj, sed ankaŭ manĝado kaj tranoktado (\*) - kio estas avantaĝo : ne necesos kuri de parto al alia tra nekonata urbo !...

La prezo - ne jam definitive fiksita - estos verŝajne ĉ. po 85 FF tage, ĉio enkalkulita (loĝado + 3 manĝoj), kio ne estas tre multekosta, precipe kompare kun la ĝeneralaj prezoj, kiuj, en tiu apudsvisia regiono, estas la plej altaj de Francio.

La ekskursoj celos, ĉu vizitadon de la malnova Ancecy, ĉu ŝipadon ĉirkaŭ la lago por la duontaga, kaj verŝajne vizitado de la najbara lago de Aix-les-Bains por la tuttaga. (Organizos tiun tuttagan ekskurson la tre vigla kaj simpatia Chambéry-grupo).

La markojn de la kongreso oni jam povas mendi al :  
SIRE, 16 chemin de l'Abbaye, 74000 ANNECY le Vieux.  
8 markoj kostas 1,40 FF, kiujn oni povas pagi ĉu per poŝtmarkoj, ĉu per poŝtĉeko por : Ancecy-Esperanto  
CCP 1482 08 U LYON (Aldonu afrankitan koverton por sendado).

\* \*

(\*) tamen sciu tuj, ke tranoktado okazos en dulitaj ĉambroj. Ĝisostaj unuopuloj devos pagi suplementon, kaj oni povos kontentigi nur la dek plej fruajn postulantojn.

Atlantikaj Pireneoj

En P A U O : de la 5a de novembro ĝis la 3a de decembro  
 \*\*\*\*\* okazos ekspozicio pri E<sup>o</sup> : "L'Espéranto,  
 langue vivante pour le Monde".

La deputito-urbestro anoncis sian ĉeston dum la inaŭguro.  
 La ekspozicio okazos en la urba Biblioteko.

En Lot-departemento

SOUILLAC : Fine de la studjaro, deko da lernantoj sukcese  
 \*\*\*\*\* trapasis la ekzamenon "Atesto pri lernado".

Lastan jaron funkciis du kursoj, unu en Sujako,  
 alia en Salignac. Tiu lasta, kiu grupigis ĉefe knabinojn, ne  
 rekomenciĝos, ĉar la knabinoj konsideras tro peza la labo-  
 ron, kiun ili devas plenumi en liceo aŭ kolegio, ke ili  
 aldonu kroman. Tamen ili ne tute forlasos E-on. Dank'al la  
 perkorespondaj rondetoj de ICEM-Esperanto (responsas kdo  
 GENTE en Avignon), ili povos plu praktiki la lingvon.

En Souillac, firma kerno de 5-6 ĝisostaj fidel-  
 uloj trabatas sian vojon al pli alta ŝtupo. Cele al varbado  
 de freŝaj elementoj, ni okazigos propagandkunvenon, komence  
 de novembro, en la kadro de Laika Amikaro.

En Ĝirondio

La 8a de novembro, je la 15a horo, nia grupo kunvenos  
 en GUJAN-MESTRAS. Verŝajne tiu renkontiĝo okazos en la  
 urbodomo aŭ en la apuda fest-salono.

En decembro : nia grupo proponas sin por organizi la  
 Zamenhof-tagon (aŭ semajnfino).

En Hispanio

- \* La 8a E-Renkontiĝo de la Valenciana regiono arigis pli  
 ol 100 partoprenantojn en "Buñol". En Gandia okazis la  
 4a HEJS-Tendaro kun pli ol 40 partoprenantoj.
- \* Sukcesis ankaŭ la Hispana Kongreso en Madrido.  
 Venontjare, ĝi okazos en Murcia (Suda Hispanio).
- \* La Katalunan Kongreson en Vilanova y Geltru partoprenis  
 amikoj de Perpignan, kiuj fervore invitis por la  
 venonta franca E-kongreso.

En Francio

En sia 1981-a eldono "QUID" aldonis stultajn kritikojn  
 ĉe "Esperanto". Skribu al la editoro por protesti kaj  
 minaci pri bojkotado !